

DUMONATA REVUO/TWEEMAANDELIJKS TIJDSCHRIFT

Sonorilo

65-a jaro, n-ro 5

oktobro-novembro-decembro 1973

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



Sonorilo

Oficiala organo de Belga Esperanto-Federacio, St. Bernardsesteenweg 1078,
2710 Hoboken.

Poŝtĉekkonto: 1634.34 de BEF, Oude Donkiaan 83,
B-2100 Deurne.

Prezidanto: D-ro Pol Denoël, Rue Victor Raskin 20, 4000 Liège.

Redakcio: Drakenhoflaan 97, 2100 Deurne.

Ĉefredaktoro: Fernand Roose

Redakcia sekretario: Paul Peeraerts

FONDAĴO M. Jaumotte-Loquet

FONDAĴO por la Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO

Kapitalo: 142 005 BF aldonaj pagoj akceptataj pere de la pĉk 2914 29 de
Maertens G., Brugge 3.

Donacoj al la fondaĵo pere de oficiala akto (ekz. per notaria akto) estu
adresitaj al BELGA ESPERANTO-FEDERACIO, asocio leĝa, por la
fondaĵo. Antaŭdankon!

Familio F. Govaerts/Hoboken	1000 fr.
Antaŭa saldo	142005 fr.
Entute	143005 fr.

MET WELGEKENDE
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING

in't duifken

GROTE KEUS
IN GERED E KLEDING.

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN
UNIFORMEN - CABARDINEN - LODENS
STIJLVOL MAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

SUR LA KOVRILO :

Jen parto el la granda amaso kiu partoprenis en la lasta Interna -
cia Seminario de GEJ en Kassel dum la Kristnaskaj Ferioj.
Denove junuloj el pli ol 10 landoj kunvenis, inter kiuj 5-kapa
delegacio el nia lando.

Du Realaj Ŝancoj Por Esperanto?

La legantoj de Esperanto-revuoj scias ke en preskaŭ ĉiu numero aperas (serio de) "venkoj" de esperanto en iu fako aŭ en iu asocio. Ankaŭ oni mencias kun emfazo la favorajn deklarojn de iu " eminentulo ". Ha, tiuj favoraj paroloj . . . sen agoj! La sola sekvo ĝis nun estis ke kelkaj gesamideanoj naive kredis ilin, atendis konsekvence la baldaŭan finan venkon de nia idealo . . . kaj nun sen- iluziiĝis.

En la tre interesa libro "Bona Ŝanco" de d-ro Bormann, eldonita de "Stafeto", la aŭtoro klarigas en kio konsistas tiu bona ŝanco por Esperanto, kaj por kiam; nome por tempo kiu ankoraŭ kuŝas, por nedefinita daŭro, en la estonto. Tamen povas esti ke ni nun staras antaŭ du realaj atingajoj, kiuj certe povas alkonduki nian lingvon al serioza proksimigo de la realigo de niaj planoj.

1) Fonto de informado: la revuo "Esperanto" de okt. '73. Pasintan jaron la Slovenia Esperanto-Ligo faris enketon pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn. 60 komunumestroj de la 60 enketitaj komunumoj reagis pozitive! Sekve de plia agado 44 komunumoj fariĝis "amikoj de Esperanto" kune kun 378 elementaj kaj 121 mezaj kaj supera lernejoj. Plie 435 pedagogoj el 40 komunumoj aliĝis al porinstruista kurso (je kosto de la lernejo mem). Sekve de ĉio tio la Slovenia Ligo redaktis deklaron kiu estis sendata al la Respublika Konferenco de la Socialista Unuiĝo de Slovenujo, alivorte al la parlamento de tiu ŝtato. Tiu lasta juĝis la deklaron apoginda kaj akceptinda, kaj sendis ĝin al la Federacia konferenco de la Socialista Unuiĝo de Jugoslavio. Tiu ĝenerala aŭ supera parlamento sendis la tekston al la parlamentoj de la ses respublikoj kaj de la du aŭtonomaj provincoj; kun la peto pritrakti la tekston. Poste la supera parlamento deklaru mem. Ŝajnas ke tio estas la kutima vojo. En la nuna momento ŝajnas ke ankaŭ la parlamento de Bosnio-Hercegovino subtenos la deklaron. Tiu afero estas certe eksterordinare grava kaj sekvinda. Se la plimulto de la parlamentoj siavice subtenos la deklaron, mi kredas ke ni havus la situacion pri kiu Tito mem aludis kiam li diris ke Esperanto devas eniri la lernejojn sekve de premo de el la popolo mem. Kaj tiam ni estos ekstreme scivolaj ĉu la Jugoslavia registaro estos konsekvencia.

2) Fonto de informado: pluraj revuoj. S-ro Nicolazzi de la Itala Socialista partio faris antaŭ monatoj legproponon pri enkonduko de Esperanto en la Italajn lernejojn. Intertempe li mem iĝis vicministro. Do li okupas nun ian potencpozicion, kaj havas pli da ebleco por efektiviĝi sian propran proponon. Laŭ samaj

informoj la tuta Itala Socialista partio estas tre favora al Esperanto. Ĝi sendis mesaĝon al la aliaj social-demokratiaj partioj, kiuj estas membroj de la Socialista Internacio por ke tiuj frataj partioj pripensu la proponon pri oficialigo de Esperanto. Antaŭ iom pli ol unu jaro ni povis legi ke la samspeca partio en Japanujo ankaŭ proponis favoran rezolucion je nia lingvo. Do estas antaŭvideble, ke en (baldaŭ?) estonteco nia lingvo estos oficiala lingvo de la socialista Internacio. Pro la fakto, ke tiuj partioj en multaj landoj partoprenas la regadon de tiuj landoj, estus konsekvence se tiuj partioj subtenus parlamentan agadon por enirigi Esperanton en la lernejojn.

Niaj gesamideanoj kiuj estas membroj de tiu partio povus fari kelkajn demandojn tiurilate al la gvidantaj personoj en ilia partio.

3) Tria punkto kiu eble ne jam signifas realan ŝancon por ni, sed kiu prezentas tamen gravan faktoron, estas la stariĝo en la sino de la Brita parlamento de Esperanto-grupo de parlamentanoj. Ili nombras 31 adeptojn. Ke tio povis okazi ĝuste en Britujo estas pli grava ol se tio estus okazinta ekzemple en Albanujo. Tiuj inter ni kiuj havas kontakton kun belgaj parlamentanoj, aŭ kontakton kun iuj ajn gvidantaj personoj en la socio, ne neglektu konatigi tiun fakton. Precipe al niaj parlamentanoj kaj instruaj (decidopovaj) instancoj ni emfazu tion.

F. R.

Novaj kotizoj por 1974

Tiuj kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon por 1974 bonvolu tion fari plejeble baldaŭ.

La novaj kotizoj estas jenaj:

Simpla Membro (M): 200 fr., ricevas membrokarton, la revuon "Sonorilo", "Esperanto-Panoramo" aŭ "L'Esperanto en Marche".

Familia Membro (FM): 75 fr. povas esti tiu kiu loĝas en la sama adreso kiel Simpla Membro. Li/ŝi ricevas membrokarton sed ne revuojn.

Junula Membro (JM): 75 fr. povas esti ĉiu inter 16- kaj 25-jara. Ricevas ĉion kion Simpla Membro ricevas plus la revuon "Koncize".

Kadeta Membro (KM): 45 fr. povas esti ĉiu ĝis 16-jara. Ricevas membrokarton sed ne revuojn.

Bonfaranta Membro (BM): 300 fr. aŭ pli. Ricevas ĉion kion Simpla Membro ricevas.

Tiuj kiuj krome deziras esti individua membro de Universala Esperanto-Asocio, povas iĝi:

Membro kun Jarlibro (280 fr.)

Membro Abonanto (560 fr.) Ricevas Jarlibron (2 partojn), la revuon "Esperanto" kaj membrokarton.

Membro Subtenanto (840 fr.) Havas la samajn avantaĝojn kiel Membro Abonanto.

Patrona Membro (5600 fr.) Havas la samajn avantaĝojn kiel Membro Abonanto.

Dumviva Membro (11200 fr.) Pagas unu fojon nur kaj dum sia tuta vivo havas la avantaĝojn de Membro Abonanto.

Junula Membro kun Jarlibro (140 fr.) (ĝis 21-jara)

Junula Membro-Abonanto (420 fr.) (ĝis 21-jara) Ricevas ĉion kion Membro Abonanto ricevas, plus la revuon "Kontakt" de TEJO.

La 58-a Universala Kongreso de Esperanto (Beograd 28.7 ĝis 4.8. '73)

Eĉ malsukcesinta kongreso estas ĉiam impona kaj memorinda evento: oni (re)vidas gekorespondantojn, oni starigas novajn amikajn rilatojn, multloke en la urbo oni aŭdas nian lingvon; kaj, fine, en la kongreso mem estas ankaŭ imponaj manifestacioj. Tion ĉiu esperantisto devas foje travivi. Mi kredas ke tiuj kongresoj formas la konvinkitajn esperantistojn. Per tio mi ne volas diri ke la Beograda kongreso malsukcesis; tamen sukceso ĝi ankaŭ ne estis. Tion sugestas jam la titoloj de la raportoj. La raportantoj kiuj kutime ne ŝparas la laŭdajn vortojn, nun parolas pri "surpriza kongreso ("Esperanto" sept. '73) aŭ "Beogrado sen Tito kaj Lapenna" ("Informilo de la Eo.-muzeo en Vieno; nov. '73). La nombro de partoprenantoj estis vere malalta: 1638. El la kongresa lando mem venis tre malmultaj personoj. Cetere mi havas la impreson ke nia movado malprogras en Jugoslavio.

Alia seniluziigo, je nia alveno en Beograd estis la kompleta manko de la eksteraj signoj de la Esperanto-kongreso, kiu tamen estas unu de la grandaj manifestacioj, eĉ por urbo kiel Beograd: ne flagoj, ne pankartoj, ne afiŝoj. Kia diferenco kun ekz. Sofio (1963) kie eĉ la tuta lando staris sub la signo de Esperanto. Estas ankaŭ kutimo ke la gastiganta urbo faras iun "geston" de simpatio al ni, ekzemple senpaga tramveturado aŭ io alia. Nenio tiun-ĉi fojon. Kia estis la oficiala akcepto fare de la urbestro?! Hontinda ĝi estis! Tio estis superita nur de Bruselo (1960), urbo kiu eĉ tion ne faris! Tie-ĉi stariĝas demando pri la "Honoraj Komitatoj" kaj la "Altaj Protektantoj". Se oni absolute volas honoran komitaton, oni eble direktu sin nur al tiuj kiuj vere, en agoj, simpatias al nia afero. Ja niaj esperantistoj, en sia naiveco, ĉiam emas kredi ke ni povas atendi multon de tiuj grandaj sinjoroj. Mi pensas ankaŭ ke la kongresanoj atendis ion pli flanke de la "alta protektanto". Do, kiam mi legis pri la solena fermo ke d-ro Ahrens diris: "La oficialaj instancoj kaj la publiko granskale donis la atenton, tiel gravan por la sukceso de Esperanto-movado . . ." (Esperanto: sept. '73 p. 159) mi devis ridi, kvankam amare. Feliĉe mi ridis interne tiel ke la ĉirkaŭantoj ne demandis pri la kialo de mia ridi.

Sed la serio de la seniluziigoj ne ankoraŭ finiĝis. La teatra kaj distra vesperoj ne estis kion oni rajtis esperi en la plej granda organizado de tutmonda esperantistaro, kie oni ja devus montri ion vere indan, artan, fierigan. Kelkaj eroj estis tutsimple infanaĵoj! Imagu ke iu esperantisto, en sia fiereco, alkondukus ekstermovadan personecon kiu konas Esperanton, por ke li povu valortaksi nian kulturon!

Tiel elkraĉinte mian galon (en komprenebla Esperanto: eliginte mian koleron) mi povas nun kun regajigita humoro pensi pri la bonaj flankoj de la kongreso. La solena inaŭguro estis kiel ĉiam pinto, kvankam ĝi estis nur la komenco de la kunveno. Sed tamen . . . ĝi daŭras tro longe. Kulpas multaj naciaj organizoj kiuj ne sufiĉe severe elektas la parolantojn. Gravas ke en la daŭro de nur unu minuto la parolanto diras ion sencan, kaj en flua maniero. Kaj la ĉeestantoj ĉesu aplaŭdi kie oni ne devas aplaŭdi! Ekzemple kiam la oficialulo de tri nordaj ŝtatoj parolis ne en sia nacia lingvo, kompreneble ankaŭ ne en nia lingvo, sed en la Angla, tiamaniere montrante ke laŭ li la internacia lingvo estu la Angla! Kaj la esperantistoj aplaŭdis! Mi sentis emon malaplaŭdi (vi povas en tiu vorto kompreni kion vi volas!)

La Jugoslavia vespero estis tre tre bela. Ŝajnas ke la somera universitato ankaŭ troviĝis sur alta nivelo kaj ke tre multaj personoj venis al la konferencoj. En la "Belarta Konkurso" ni menciis ke nia simpatia Antverpena prezidanto s-ro Jo Haazen akiris premion por originala prozo. Pro la fakto ke mi ne estas komitatano mi preferas ne raporti pri tiuj kunvenoj kiujn mi ne rajtis ĉeesti. De la ĝeneralaj kunvenoj mi opiniis tiun pri la lingva problemo la plej interesa. Ni vere lernis multe. Estas dum tiu kunveno ke s-ro Paul Peeraerts donis skizon pri la lingva situacio en nia lando. Por la interesigantoj mi mencias ke pri tiu belga problemo aperis artikolo en la "Kulturaj Kajeroj" (numero 3, majo-junio 1973, p. 8-9). Mi ĉeestis ankaŭ kunvenon de la delegitoj de UEA. Estas okulfrape kiel bonega afero la reto de la delegitoj povas esti por la movado. Malfeliĉe ni ne konas ĝian efektivan laboron. La delegitoj pri tio ne raportas al iu instanco (ĉetere ne ekzistas oficiala instanco por tiu tasko). Estas tial bone ke nia ĉefdelegito André Orsolini iniciatis sendi cirkuleron kun demandaro. Tiun ekzemplon povas imiti la aliaj ĉefdelegitoj.

La balo estas ankaŭ kongresero al kiu multegaj gesamideanoj sopiras. Tie oni ja dancas, gaje interbabilas (almenaŭ en la tempoj kiam la orkestro ne bruegas — post la balo mi tutsimple ne plu havis voĉon por babilii!) . . . kaj trinkas iomete. Por sama celo oni sopiras al la interkonatiĝa kunveno. Sed tiun-ĉi fojon la organizintoj elektis la plejeble maltaŭgan ejon por tiu renkontiĝo.

Kion ankoraŭ menci? La multaj fakkunvenoj? Ankaŭ tio estas vere rimarkinda en niaj kongresoj. Ĉio tio montras ke la esperantista mondo estas jam interesa medio. La plej evidenta kaj samtempe la plej ĝojiga afero estas ke ankaŭ tiu-ĉi kongreso, kvankam ne inter la plej belaj, denove montris al tiuj kiuj volas vidi, la vojon kiun devos iam suriri la homaro.

Skeptika Observanto

SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ

Por pliampleksigi la sciancan literaturon en Esperanto kaj samtempe por helpi al enkonduko de la Internacia Lingvo en la sciencajn kaj universitatajn mediojn, la Estraro de la asocio sen profita celo "Someraj Universitataj Kursoj" decidis krei novan serion de eldonaĵoj sub la nomo "SUK - Kajeroj".

En tiu-ĉi serio estos publikigitaj esperantlingvaj sciencaj verkoj, preferinde en la formo de universitataj lernolibroj. La SUK-Estraro decidis pri la eldono de certa verko laŭ jenaj kriterioj: a) la aŭtoro estu universitata aŭ samranga instruisto aŭ esploristo; b) la aŭtoro akceptu enhavan kaj lingvan kontrolon de la verko fare de alia(j) fakulo(j); c) la aŭtoro liveru la manuskripton laŭ la SUK-regularo pri eldono de tekstoj.

Ĉiukaze, la SUK-Estraro havos la rajton rifuzi eldonon de verko sen doni klarigon. La aŭtoro ricevos interkonsentandan tantiemon.

La SUK-Estraro esperas ke la subteno, precipe financa, al la Asocio kreskos kaj tiel permesos efektiviĝi tiun duan celon, gravan por la estonteco de la Esperanto-movado. Kompreneble, paralele, la SUK-Estraro daŭrigos la eldonadon de la kursotekstoj kiuj rilatas la respektivajn SUK-sesiojn.

La SUK-Estraro.

ESPERANTO-TAGO en BRUSELO dum 1974

Pro la sukceso de la Esperanto-tago dum 1971 en Bruselo kaj sub impulso de s-ro G.C. Fighiera delegitoj de la diversaj Belgaj Esperanto-Ligoj estis kunvokitaj en Bruselo, la 8/12/73.

Ĉeestis reprezentantoj de Belga Esperanto-Federacio, Belga Esperanto-Fervojistaj Asocio, Progreso de Gento (laboristoj), SAT-Amikaro.

Oni akordiĝas pri organizado de Esperanto-Tago en Bruselo dum SABATO, la 7/9/1974.

Oni elektis komitaton por la Esperanto-Tago:

Prezidanto: s-ro Ch. Strainchamps el Bruselo (SAT-Amikaro)

Vicprezidanto: s-ro L. De Sutter el Bruselo (BEFA)

Sekretariino: s-ino E. Ernst el Bruselo (BEF), Bulvaro de Smet de Naeyer 154, 1090 Bruselo (kun helpo de s-ro G.C. Fighiera el Bruselo (BEF))

Kasisto: s-ro A. Lödör el Gento (Progreso)

Gazetaj Rilatoj Flandraj: s-roj P. Peeraerts/J. Verstraeten el Antverpeno (BEF)

Gazetaj Rilatoj Valonaj: s-ro J. Gauvin (provizore) el Bruselo (SAT-Amikaro)

La aranĝo okazos la 7-an de septembro 1974 en Bruselo kaj konsistos el surstrata manifestacio, verŝajne sur la ŝtuparo de la Borso. Estos invititaj partopreni en la manifestacio ankaŭ delegacioj de esperantistoj de la aliaj ok landoj apartenantaj al la Eŭropa Ekonomia Komunumo. La antaŭan tagon, delegacio de la belgaj Esperanto-Movadoj transdonos al oficialaj instancoj (Radio - Televido - Ministerioj — Komuna Merkato) memorandumon pri la monda lingva problemo kun klaraj postuloj flanke de la esperantistoj.

Celoj de la manifestacio estos:

1. Akceli la kunlaboron inter ĉiuj divers-tendencaj belgaj (kaj eksterlandaj) Esperanto-fortoj;
2. Altiri la atenton al Esperanto de la periloj de amasa informado (gazetaro, radio, televido, film-kroniko) kaj tra ili influu la publikan opinionon;
3. Akiri konkretajn atingojn por la internacia lingvo, ekz. radia aŭ televida kurso.

HONORIGO: Kun plezuro ni aŭdas pri la honorigo de nia Prezidanto, D-ro Pol Denoël, per la medalo de "Kavaliro en la Ordeno de Leopoldo".

Tio pro la grandaj meritoj kaj sindono al tasko kiun li — ĉiutage — plenumas kun granda amo kaj dediĉo.

Nome de la administrantoj kaj gemembroj de B.E.F. ni esprimas nian ĝojon kaj varme gratulas la Prezidanton pro tiu honorigo (en la urbodomo de Lieĝo), esperante ke li povas ankoraŭ daŭrigi la plenumadon de tasko, tiel kara al li, kaj el kiu li ĉerpas la vivoĝojn tiom necesa en la nunaj malfacilaj tagoj.

Kun pliaj gratuloj ni emfazas, en tiu honorigo, la karan edzinon, s-inon A. Denoël, kiu sendube amplene fieras pri tia edzo, tiom okupata ĉiam, sed tiom plenzorga samtempe!

Ili ambaŭ, kunaj, ankoraŭ vivu dum longaj kaj feliĉaj jaroj!

LA BELGA KONGRESO EN LIEĜO

Kongresa Komitato : Denoël, reu Victor Raskin 20, 4000 Liège.

Provizora Programo

Sabato 13-a de Aprilo:

Posttagmeze — Akcepto en la Hotelo
Giĉeto kun speciala poŝta stampo.

Kultura kaj distra Vespere.

Dimanĉo 14-a de Aprilo:

Solena kunsido
Akcepto de oficialuloj
Vizito al kuriozaĵoj
Di-servo (eble ekumena)
sur **preĝejo-ŝipo**
Bankedo kaj Balo.

Lundo 15-a de Aprilo:

Tuttaga aŭtoĉara Ekskurso tra la verda
Herva lando. Vidindaj kuriozaĵoj. (100 km).

Restadaj kondiĉoj

Hotelĉambroj:

En hotelo "Ramada" estas allasitaj tra favoraj kondiĉoj por antaŭe rezervitaj ĉambroj. En la ĵus konstruita hotelo ĉiuj ĉambroj estas luksaj kaj komfortaj (privataj necesejo, banujo, duŝo, radio aŭ televido, telefono, individue regul-ebla hejtado).

Popersone kaj po-nokte:

2-personaj ĉambroj: 350 b. fr.
1-personaj ĉambroj: 450 b. fr.

(ĉio enkalkulita: matenmanĝo, servmono, imposto).

Komuna dormejo (aliloke): 50 b. fr.

Manĝoj:

Speciala kongresa manĝo (sabato vespere kaj dimanĉon): 150 b. fr. — imposto enkalkulita, sen servmono nek trinkaĵo).

Bankedo:

Tre valora bankedo, dimanĉon vespere (sekvota de kongresa balo): 285 b. fr.
— vinoj, imposto kaj servmono enkalkulitaj.

Lunda ekskurso: 150 b. fr. (inkluzive de malvarma tagmanĝo).

SEMAJNO DE LA INTERNACIA AMIKECO (SIA): 1974 02 18 ĝis 24

La lasta semajno de februaro nun jam tradicie estas la Semajno de Internacia Amikeco. En Kalmthout (norde de Antverpeno) jam plurvoje estis okazigataj interesaj programoj kiel ekzemple dum 1973 kun grandega sukceso.

Tiun ĉi jaron la Kalmthouta Esperanto-Grupo "La Erikejo" denove invitas vin ĉeesti sian "amiko-tagon", la 23-an de februaro. Jen la kompleta programo:

12 h. Akcepto en la komunuma domo (por invititoj).

14 h. Komenciĝo de la "translima promeno" ĉe la stacidometo de Heide. Survoje, ĉe la landlimo okazos paroladoj. La vojo estas 8 km longa kaj daŭros ĉ. 3 horojn. Por ŝatantoj ekzistos pli mallonga vojo kaj veturos aŭtoj.

17.30 h. Foriro ĉe la preĝejo de Putte (Nederlando), per aŭtoj.

18 h. Kunveno pri "Kien la Semajno de Internacia Amikeco". Manĝebleco. Salono Trefpunt, Statielei 9, Heide.

19.15 h. Diservo en la preĝejo de Heide.

20 h. Internacia dancvespero en Salono Trefpunt.

En 1973 ĉeestis 6 nacioj. Kiom nun?

NOVAJ TELEFONNUMEROJ

Verŝajne ĉiu nun jam scias ke la 19-an de julio 1974, je la 8-a horo vespere, ĉiuj belgaj telefonnumeroj ŝanĝiĝos. Por helpi al niaj membroj, ni publikigos liston de ĉiuj personoj kiuj havas funkcion en la belga Esperanto-movado kun iliaj novaj telefonnumeroj. Tiu ĉi listo aperos en la venonta aŭ postvenonta numero de "Sonorilo".

Por povi realigi tion ni petas ke ĉiuj funkciuloj (estraranoj, administrantoj ktp.) de BEF kaj de ĉiuj lokaj kaj fakaj grupoj, jam nun sciigu sian novan numeron (distriktan numeron + personan numeron) al la redakcio.

Ni proponas la jenan formon:

Nomo:

Funkcio en la movado:

Adreso:

Nova telefonnumero:

NIA KALENDARO

27 julio 1974 — 3 aŭgusto 1974: 59-a Universala Kongreso de Esperanto en Hamburg (Germanujo). Informoj kaj aliĝoj ĉe ĉiu Esperanto-grupo aŭ ĉe f-ino A. Orsolini, rue Paul Pastur 6, B-6000 Charleroi.

4 aŭgusto 1974 — 10 aŭgusto 1974: 30-a Internacia Junulara Kongreso en Münster (Germanujo). Informoj sekvos.

BIBLIOGRAFIO

NOVA! NAŬLINGVA VORTARO POR KOMERCO KAJ EKONOMIKO

- ★ Nepre necesa helpilo por ĉiu komercisto kaj ekonomikisto.
- ★ kompilita pere de Esperanto
- ★ ĉ. 2000 terminoj **klarigitaj** en Esperanto kaj la angla
- ★ tuja superrigardo de la **tradukoj** en ĉiuj aliaj monde gravaj lingvoj
- ★ kun detalaj indeksoj en Esperanto, la germana, hispana, franca, itala, nederlanda, portugala kaj sveda.

Ĉi tiu unika vortaro rezultis el naŭjara fuktodona kunlaboro internacia. Ĝin kompilis, sub aŭspicio de Instituto por Esperanto en Komercio kaj Industrio (EKI) — Nederlando, pluraj fakuloj.

Enhavo/Aranĝo

- ★ Ĉi tiu vortaro enhavas la specifan terminaron de la organizo kaj tekniko de la komercio, la ekonomiko kaj la socia ekonomiko. Granda nombro de la traktitaj vortoj ne troviĝas en ĝeneralaj vortaroj, multaj eĉ ne en fakaj vortaroj. "Simplaj" terminoj kiel pensio, salajro, libertempo, striko k.s. estas traktitaj pro la soci-ekonomika graveco.
- ★ Krom la terminaro la vortaro enhavas la klarigon aŭ difinon de la traktitaj vortoj en Esperanto kaj la angla. Pro tio tiu ĉi libro estas ne nur vortaro sed ankaŭ studlibro.
- ★ Ĉi tiu libro estas naŭlingva. Ĉiu termino estas difinita en Esperanto kaj la angla. Unurigarde la leganto trovas la tradukon en ĉiu monde grava lingvo. Per sistemo de indeksoj (po unu por ĉiu lingvo) ĉi tiu libro estas tuj konsultebla pere de ĉiu el la naŭ koncernaj lingvoj.

formato : 15 x 21,5 cm
bindita : ĉ. 600 paĝoj
prezo : 65,— gld.;
por membroj de Esperanto-asocioj 57,50 gld.
aperdato : septembro 1973
eldonas : Kluwer / Nederlando — Peras: UEA.
Mendebila ĉe ĉiu Esperanto-grupo.

NOVA, ALLOGA LEGOLIBRO POR KOMENCANTOJ

Jus aperis la libro "AMUZAJ DIALOGOJ", verkita en simpla lingvo-stilo por faciligi al novaj lernantoj lerni paroli la Internacian Lingvon. La libron verkis Albert Lienhardt, ilustris franca karikaturisto Arfoll kaj eldonis Universala Esperanto-Asocio.

Tiu novspeca legolibro enhavas 20 dialogojn kun 2000 konversaciaj frazoj, kutimaj parol-turnoj, demandoj kaj respondoj, kiuj ebligas al lernantoj kaj progresemuloj ekzercadi sin en la parola uzo de Esperanto. Dudek tutpaĝaj humuraj desegnaĵoj ilustras la dialogojn kaj prezentas plian valoran materialon por demandoj kaj respondoj en la kurso.

Precipe grava estas la laŭgrada aranĝo de la dialogoj, kiu permesas al la lernantoj progresi de tre simplaj tekstoj al la nivelo de normala konversacia lingvaĵo. En la klariga antaŭparolo troviĝas ankaŭ valoraj konsiloj por la kursgvidantoj.

Tiu amuza kaj instrua legolibro estas bele presita sur luksa papero kaj fortike broŝurita en oportuna poŝformato. La litertipo estas oportune granda.

Titolo:

Amuzaj dialogoj en Esperanto —
por faciligi al novuloj lerni paroli
la internacian lingvon.

Aldone:

850 didaktikaj demandoj kaj
respondoj.

Aŭtoro: Albert Lienhardt

Eldonis:

Universala Esperanto-Asocio,
Rotterdam, 1973

Paĝoj: 141

Formato: 21,6 x 12 cm

Prezo 70 fr.



ALVOKO

Kiu povas helpi?

Ni ricevis la kopion nur de adresflanko de poŝtkarto, kiun skribis D-ro Zamenhof al Sinjorino Posenaer, Kroonstraat 45, Borgerhout-Antwerpen, Belgio.

La rusa poŝtstampo ne estas legebla, la dato de la poŝtstampo en Antwerpen verŝajne estas la 4.5.1912.

Ni kore petas vin, Karaj Esperantistoj, se iu de vi havas la poŝtkarton, sendu al ni la fotokopion de ambaŭ flankoj de la poŝtkarto.

"Morso-Klubo", Robert Fisker, tradukis Gudrun Riisberg, eldonis Dansk Esperanto-Forlag, Ingemannsvej 9, DK-8230 Åbyhøj. Formato 14½ x 20½ cm, 32 paĝoj, prezo: 4,50 D.Kr.

"Morso-Klubo" estas tre plaĉe aspektanta libreto kiu konsistas el du rakontoj por junaj geknaboj. Ili estas tre facile kompreneblaj, kaj el lingva vidpunkto, kaj el enhava. Krom du gravaj preseraroj sur la komencaj paĝoj, ni ne trovis ion riproĉeblan.

Ni povas konsideri la verketon bela donaco por junaj geknaboj. Ankaŭ plenkreskuloj kiuj ankoraŭ neniam legis ion en Esperanto, povos ĝin uzi kiel unuan facilan kontakton kun la lingvo.

Marjorie Boulton: "Ni Aktoras". Eldonis Dansk Esperanto-Forlag sub direktado de L. Friis en Åbyhøj, Danujo. 36 paĝoj. Prezo: 4 Dan. Kron.

Samideano L. Friis, organizanto de la Helsingør-Feriokursoj, kiu jam eldonis multajn valorajn librojn, havis la bonan ideon (inter multaj) eldoni ankaŭ serion da "Gajaj Klubvesperoj". Ne necesas akcenti ke tio respondas al bezono en multaj kluboj. La jena libreto estas la dua en la serio kaj ĝi enhavas tri komedietojn verkitaĵojn de M. Boulton. La nomo de la verkintino mem estas jam garantio pri la taŭgeco. Efektive ili estas gajaj, sed kompreneble postulas bonajn aktorojn por plene sukcesigi ilin. Samtempe oni lernas multajn vortojn kaj tiel estas kunigitaj la gajo kaj la instruo. La prezo estas plej modera.

Heinrich Heine: "Kantoj kaj Romancoj". El la Germana tradukis Kalman Kalocsay kaj Gaston Waringhien. Eldonis "Stafeto" sub gvidado de Prof. J. Régulo Pérez en La Laguna de Tenerife, jaro 1969. 381 paĝoj. Prezo: totalbindita 6; broŝurita 4,80 Us. Dol.

Heine apartenas al la mondliteraturo. La kaŭzoj: li estas samtempe superega esprimo de romantikismo kaj de la moderna skeptikismo. Tion li esprimis artmaniere (ne malofte kun tre sprita ironio). Tiuj du karakter-ecoj estas enaj en ĉiuj homoj. Ofte en sia vivo la konscia homo estas romantika kaj bezonas romantikismon; ofte li iĝas ankaŭ skeptika. Pliigis la famon de Heine la fakto ke multaj de liaj kantoj estis efektive muzikigataj (i.a. de Schumann). Liaj verkoj estas en multaj lingvoj tradukitaj, eĉ en la Japana. Tamen multaj esperantistoj ne konas la germanan kaj ne disponas pri traduko. Do Esperanto devis posedi ankaŭ tiun-ĉi verkaron kiel ĝi devis posedi la Dantan Komedion, la poemojn de Baudelaire, la Bibliion kaj la Koranon k.a. Ni danku Waringhien kaj Kalocsay ĉar ili tiel penis pri la malfacilega longdaŭra tasko de fidela kaj samtempe arta traduko. Ili kiuj povus akiri multe pli da famo kaj ankaŭ materiajn avantaĝojn se ili volus verki en nacia lingvo. Memoru ke antaŭ oficiala akcepto, nia lingvo devas fariĝi kulturlingvo — kaj en kiom alta grado tiaj tradukoj efektivas tion. Memoru ankaŭ ke ekzistas nur mil ekzempleroj!

Ferenc Szilagy: "Trans la Fabeloceano" 135 paĝoj. Eldonita de Dansk Esperanto-Forlag sub direktado de L. Friis. Adreso Ingemannsvej 9, DK-8230 Åbyhøj, Danlando. Bindita. Prezo: 23 Dan. Kronoj.

Tiu ĉi libro estas represo de jam en 1931 eldonita fabelaro de Literatura Mondo.

La reeldono estas tre plaĉa, same kiel la ilustraĵoj. Kiu konas Szilagy scias ke li brile skribas kaj priskribas. Sed cetere...ne ĉiuj ŝatas fabelojn aŭ nurajn priskribojn. La novelo (?) "La infano revadas" temas pri la infano de L.L. Zamenhof. Kelkaj fabeloj estas signifoplenaj kiel ekz. "Pri la malkontenta eta birdo".

Ivo Andrić: "Sonĝo kaj Maldormo sub la Karpeneto". 80 paĝoj. Prezo: 2 dolaroj aŭ 30 dinaroj. Eldonita de la Internacia Kultura Servo, Amruševa 5/1 en 4100, Zagreb, Jugoslavio. Tradukinto: Roger Imbert kaj Tišljara Zlatko.

La Bosnia aŭtoro prezentas la Bosnian vivon dum okupado de Aŭstrio-Hungario. La vivo estas simpla; kaj tamen prezentas malfacilajn problemojn por la Bosnianoj. La rakontoj estas premaj; ili estas plenaj de rmal fido, de suspekto de unu je la aliaj en la malriĉaj vivcirconstancoj. Ne amo, nur la pezo de la vivo. Oni devas legi kun atento; sed tiam oni estas kaptita. Valora libro kiu meritas pli belan eldonmanieron. Bedaŭrinde estas multaj preseraroj.

F. R.



SCIIGO PRI INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUTO

En la tridekaj jaroj fondiĝis en Hago la Internacia Esperanto-Instituto. Sub gvidado de la famkonataj S-ino Isbrücker kaj S-ro Cseh la instituto floris. La mirakla instrumentado de S-ro Cseh vekis ondon de entuziasmo. En la leginda libro "La Internacia Lingvo", eldono de U.E.A., D-ro Lapenna diras pri ĝi: "La ĉefa karakterizilo de Cseh-metodo estas, diference de la metodo Berlitz, senigo de lernolibroj.

Estas akcentinde, ke la lernanto laŭ tiu metodo tre baldaŭ ekparolas en la Internacia Lingvo".

Dum multaj jaroj S-ino Isbrücker kaj S-ro Cseh eldonis la revuon "La Praktiko" nomatan "la gazeto, kiu instruas kaj amuzas".

Sed S-ino Isbrücker mortis. S-ro Cseh ne akceptis helpon kaj dum longa tempo klopodis tutsole estri la laboron, sed pro liaj aĝoj kaj malsaniĝo ne sukcesis en tio. La gazeto ne plu aperas, kaj la aferoj de la Instituto malordiĝis.

Nun aliaj estraranoj decidis reordigi kaj revigligi la Instituton. S-ro Cseh ne plu estas direktoro kaj ne plu loĝas en la oficejo de la Instituto.

La adreso de la Instituto restas la sama: Riuwstraat 172, Hago — Nederlando. Telefonoj: 070-556677 kaj 070-669353. Ekde nun la libroservo kaj aliaj okupoj denove funkcias normale. Eble multaj esperantistoj havas motivon por plendi pri la Instituto pro tio, ke oni ne ricevis respondon al letero. Tion ni ne povas ripari, sed S-ro Cseh kunprenis centojn da leteroj kun la laŭdinda intenco respondi ilin. Ni estas konvinkitaj, ke li verŝajne ne kapablos fari tion, do, ni petas pardoni lin. Sed povas esti io pli grava; ekz. fakturoj nepagitaj, mendoj neplenumitaj, aŭ aliaj sufiĉe gravaj faktoj, kiuj malserenigas vian agrablan memoron pri la Instituto. Tiukaze ni petas vin informi nin pri tio, kaj ni klopodos fari ĉion eblan por kontentigi vin.

Ankaŭ la kontraŭo estas ebla: ekz. ke vi ankoraŭ ŝuldas ion al la Instituto. Eble vi ricevis sendajon sen fakturo aŭ enkasigis monon por liveraĵoj, kiuj ankoraŭ ne estas reguligitaj? Se vi informus nin pri tio, ni vere ĝojus. Cetere ni petas vin, konservi en honoro la memoron pri la mortinta S-ino Isbrücker kaj pri S-ro Cseh, tiuj grandaj pioniroj, kiuj multe faris por la Esperanto-Movado!

En la nomo de la estraro de
Internacia Esperanto-Instituto,
J.H. Vink

KORESPONDI DEZIRAS...

Svedo, 54-jara sola vidvo, volus kor. kun belgianino pri literaturo, arto kaj naturo. Arne Bengtsson, Abubergsgatan 32, S-43131 Mölndal, Svedujo.

F-ino Ellen A. Lewis, 15 Salisbury Road, Brookline, Mass. 02146, Usono, dez. kor. kaj ankaŭ peras por aliaj geusonanoj.

38-jara hispano dez. kor. M. Montala, Servet 11, Barcelona 16.

Hispana Esperanto-lernanto ŝatus kor. per bildkartoj. Manuel Muniesa, Virgen de Lourdes 24-26 2° 4°, Barcelona 16.

Kiu deziras korespondi kun f-ino Bozena Raczek, ul. Puchaxca 11/21, PL-20-323 Lublin, Polujo?

27-jara muzikisto dez. kor. kun gebelgianoj. Miĥail Lineckij, Minskoc ŝosse N/O KV N 99, SU-252114 Kiev, Sovetio.

Ĉirkaŭ 200 gelnantoj el Britujo deziras havi plumamik(in)on! Peras s-ro A.E. Nutton, South Craven School, Holme Lane, Cross Hills, Keighley BD20 7RL, Yorkshire, Britujo.

22-jara hungaro kiu praktikas sporton (futbalo) kaj kolektas poŝtmarkojn, ŝatus korespondi pri supre nomitaj temoj. Konda Lajos, Varsoj 1, H-2120 Dunakesri, Hungarujo.

Grupo da gelnantoj 9- ĝis 12-jaraĝaj dez. kor. Peras E. Rish, Coonly School-201, 4046 N. Leavitt, Chicago, Ill. 60618, Usono.

16-jara knabo dez. kor. kun samaĝa knabo aŭ knabino ie ajn. Marc Holsteyn, Rinskopflaan 5, B-9001 Gentbrugge, Belgio.

S-ro Slavec Matucha, CS-54371 Hostinné, Husitská 413, okres Trutnov, Ĉeĥoslovakio, dez. kor. pri ĉt.

Ni ŝatus trovi korespondantojn en Belgio: —Bojan Genkov, ul. Galićika 36, Sofia 26, Bulgarujo.

—Wilhelm Schuh, Dorstenerstr. 145a, D-463 Bocheim, Germanujo.
—Cvjatko Todorov, p.k. 60, Sumen (Bulgarujo).

—Vladimir Hampl, Urybnička 1517, CS-56002 Ceska Třebova, Ĉeĥoslovakio. (kolektas alumetetiketojn).

Mi interesiĝas pri reproduktajoj, bildkartoj, keramiko, lingvoj, filmoj, teatraĵoj, diskoj, libroj. Mi dez. kor. kun gejunuloj el Belgio. Bota Judit, H-1182 Budapest, Kossuth L. u. 136, Hungarujo.

35-jara edziniĝinta s-ino dez. kor. pri kuirado, poŝtmarkoj, vojaĝoj, pupoj. Jobj Vooren-Koogje, Canaverlastraat 21, Krommenie, Nederlando.

DISE EN LA MONDO

Pere de la franca eldono de "E esperanto Programita", ĉ. 40 geinstruistoj el Belgio lernas Esperanton, kaj samtempe 12 personoj kiuj laboras en la Komuna Merkato en Bruselo (gp).

Dezirus verki militistan terminaron kaj pro tio serĉas kunlaborantojn tutmonde: H.W.R. Petersen, 180 Onepu Road, Lyall Bay, Wellington 3, Nov-Zelando.

Inter siaj internaciaj publikaĵoj la sveda Kooperativa Federacio eldonis 30-paĝan, ilustritan informilon kun la titolo: "La Konsumkooperada movado en Svedujo". Ĝi priskribas la kooperativan movadon el diversaj vidpunktoj. La informilo estas senpage ricevebla. Skribu al jena adreso:

Kooperativa Federacio
Internacia Servico
S-104 65 Stokholmo 15
Svedujo

Ne forgesu diri, ke vi deziras la Informon n-ro 96-1000 en Esperanto. En via letero aŭ pk. menciu ankaŭ: Ref. INTER-grupo, Gotenburgo.

EN LA ESPERANTA GAZETARO

Aperis Sennacieca Revuo 1973. Kiel ĝiaj antaŭuloj, ĝi enhavas tre multajn kontribuojn verkitajn pri plej diversaj temoj, soci-politikaj, kulturaj, historiaj, ekonomiaj. Kelkaj artikoloj estas ilustritaj. Eldonas Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 avenue Gambetta, F-75020 Paris. Prezo: 50 fr.

ITENERO estas denove nova revuo, stencilita, 6-paĝa. Malgraŭ la malplaĉa ekstera aspekto, interesaj informoj pri internacia turismo (en tiu numero, aŭ eble ĉiam?, bedaŭrinde nur pri socialismaj landoj). Kontraŭ rpk. petu ĉe Pola Esperanto-Asocio, Vojevodja Estraro, Turisma Komisiono, Skr. Poczt. 16, PL-50 952 Wrocław 17, Polujo.

En DE VOLKSKRANT (Amsterdamo) aperis vere stranga letero de leganto (licenciulo) kiu pledas por la forigo de la nederlanda kaj ĉiuj aliaj naciaj lingvoj. Li pledas por la uzo de la loka dialekto kaj apud tio Esperanto kaj provizore ankoraŭ la angla. Laŭ li altrudo de nacia lingvo estas lingva diskriminacio.

Dez. kor. kun knabo de proks. 14 jaroj: Herman Martens, Heistraat 29, B-2170 Wuustwezel, Belgio.

Ĉina Esperanta monata gazeto

EL POPOLA ĈINIO

Varbas abonantojn de 1974

Abonprezo:

1 jaro 90 b.fr.

2 jaroj 135 b.fr.

3 jaroj 180 b.fr.

Abonu ĉe:

Eldoneo - Libreo "Sonorilo"

Sint - Pieters - Kerklaan 61

8000 BRUGGE

(pck. 1521.40)

aŭ rekte ĉe Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo,
P.O. Kesto 313, Pekino Ĉi

Specimeno akirebla senpage



Por ĉiuj viaj asekuroj kaj reasekuroj

unu adreso :

J. VERDYCK & Co P.V.B.A.

ANTWERPEN, Lange Nieuwstr. 30

Telef. 03/320902 - Telekso 32283 - Telegr. "Dyckassur"

Agentejo en Nederlando:

ROTTERDAM, Korte Hoogstraat 9

Telefono 1142 19 - Telekso 23243 - Telegr. "Pemwem"

Reprezentita en Londono kaj ĉe "Lloyd's of London".

Korespondantoj en la tuta mondo

Unuaklasa servo

Kompetentaj fakuloj

KORESPONDO EN ESPERANTO

P. V. B. A.

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

St.-Bernardse steenweg 631

Hoboken

Vitraloj - Speguloj -

„securit“ vitro

kolorigitaj vitroj

aluminiaj senmastikaj

stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por

tutvitra-konstruaĵoj

mastiko

Telefono 272875